


Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4, Aprilo, 2007

# Skize pri la vojaĝo

*Gregory S. Dolgin*



2006-jare mi aliĝis al programo "Volunteers for Israel" (Volontuloj por Israelo) kaj la 4-an novembre mi venis al flughaveno Ben Hurion.

Nur antaŭmonate finiĝis la vica batalo kontraŭ provokaj Ĥamas kaj Ĥezbola. Israelo – lando de miaj antaŭŭloj kaj parencoj bezonis ne tiel fizikan helpon, kiel solidarecon. Tiutage en la flughaveno kolektiĝis ĉirkaŭ 100 volontuloj el diversaj landoj, ne nur hebreoj, sed ankaŭ alinacianoj. Respondeculo de l' programo dividis la alvenintojn laŭ 4 grupoj, kaj direktis ilin por nemilitaj aferoj: por ripari iajn objektojn, al farmacia centro, nutraĵ-deponejo, teknika bazo.

Mi trafis en la kvaran grupon. Civila, tamen prigardita buso veturigis nin laŭ pitoreska vojo. Unue vidante la ĉirkaŭon, mi sentis ĉion kiel delonge jam konatan. Mirinda lando! Jen belega arkitekturo de l' ĉefurbo Telavivo, precipe ĝia norda parto, la simpatiaj aliaj urboj, urbetoj, florantaj novembre arbustoj, verdaj kampoj, diverskoloraj montetoj, helblua maro – Mediterania!




Jen ankaŭ nia bazo. Sekvatage ni komencis kompletigi kaj paki diversajn instrumentojn, detalojn. Vestitaj en la uniformon, ni laboris nur po 7 horojn, anstataŭ supozitaj de ni po 8 aŭ eĉ po 9. Oni nutris nin bone, kvankam laŭ mia gusto iom nekutime. Ni konversaciis prefere en la angla. Ĉu renkontiĝis tie esperantistoj? Jes, kvankam duope nur: mi kaj s-ro Valerij N. – rusiano.

En Israela armeo servas, krom junaj viroj, ankaŭ junulinoj. Komandanto de l' bazo, la servistoj kaj gardistoj rilatis al ni bonvole, afable. Precipe plaĉis al ni la kamionisto – origine israelano, ridetnomita de ni Leĥaim (kio signifas hebree: Je la vivo!), serĝentino Liza, deveninta el Ukrainio, soldatino Klara, naskiĝinta en Argentino kaj kaporalo (ĉefsoldatino) Daniela, 19- kaj duon jara. Daniela, naskita en Usono, perfekte posedis la anglan kaj la hebrean.

Mi rigardis la junajn virinojn tenantajn, anstataŭ la beboj, mitralojn. Kaj mi apenaŭ sufokis larmojn. Kial Israelo – pacema lando kun 3-miljara historio devas tiel militiĝi? Ja por defendi sin.

Ripoztagaj en Israelo estas vendredo kaj sabato. Samajn 2 tagojn ni pasigis kun la alia grupo en urbo Jaffo. Iu oficisto, parolanta nur la hebrean, proponis por la ĉirkaŭ 50-persona aŭditorio gravan informon. Starantaj ambaŭflanke po 2 tradukistij interpretadis al la ĉeestintoj ties informon en la anglan, francan, hispanan kaj rusan. Ripetata kvarlingve, la 10-minuta prelego daŭris dum 50 minutoj. Kaj tutegale tio ne sufiĉis. Ja la triopo el Hungario posedis, krom sia lingvo, iomete nur…la germanan. Jen konkreta ekzemplo pri urĝa neceso de Esperanto! Plenuminte la dusemajnan mision, ni disiĝis. Mi vizitis miajn parencojn, poste venis en Jerusalemon por omaĝi antaŭ Muro de l' ploro kaj en la ĉirkaŭurba tombejo. Noktumis mi en Jerusalema hotelo "Arkadia". Tie mi komencis verki rakonton pri la impresoj.

Mi finverkis ĝin, reveninte en Usonon. Kaj ĉiutage antaŭ mia interna rigard' vidiĝis, tenanta la mitralon, kaporalo Daniela, kies figuro iĝis por mi kiel simbolo de nuna Israelo. Tiu ĉi rakonto, titolita "Madono de Israelo", aperis la 18-an decembre 2006 en ĉefa ruslingva gazeto en Usono "Obzor – Weekly" (Semajna observo). Nun eblas trovi ĝin en Interret-arkivo.

La aliaj publikigoj, komentoj al ili kaj informo pri miaj libroj: "Spektro de l' Tempo", "Al juna amiko" kaj "Sintezo de Harmonio" atingeblas en Interreto simple: Google Gregory Dolgin, ankaŭ Google Grigorij Dolgin, same – ruslitere (per komputilo, entenanta la rusan programon kaj klavaron). Jen kio skize. Dankon por la atento!

## Librobreto

BBC aranĝis la opini-esploron kaj evidentiĝis, ke meza brito dum sia vivo elspezas pli ol 4 mil pundojn (pr. $ 8000) por propra libraro. Fakte, ni ne estas britoj kaj ne multaj el ni estas britdevenaj. Sed, ĉu vi elspezas iom por pligrandigi vian librokolekton kaj ĉerpi sciojn Esperante? Se jes, legu plue. Vojaĝo en E-lando de akademiano B. Kolker konkeris la unuan lokon en la vendostatistiko de la Libroservo de UEA en 2006, jam por la kvina sinsekva fojo. Tiu perfektiga legolibro kaj gvidilo tra la Esperanto-kulturo estis vendita en 347 ekzempleroj kaj ĝia tradicia rivalo, la listo de gastigantoj de Pasporta Servo, en 322 ekz. Kun 272 ekz. tre bone startis la vendado de la diskut-instiga verko de Humphrey Tonkin, Lingvo kaj popolo, aperinta jarmeze. Apud Gerda malaperis! de Claude Piron, kiu jam havas konstantan lokon en ĉiu furorlisto. pasintjare la plej populara libro de alia eldonejo ol UEA estis Plena manlibro de Esperanta gramatiko de Bertilo Wennergren, kiu post multjara konsultebleco en la reto fariĝis alirebla ankaŭ en presita formo.

## Gratulojn al:

La kvin komitatanoj B, kies oficperiodo komenciĝos je la unua tago de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, estas Marija Beloevic (Kroatio), Tomasz Chmielik (Pollando), Johan Derks (Nederlando), Istvn Ertl (Luksemburgio) kaj Jukka Pietilainen (Finnlando).

Vendredon, la 30an de marto, la prezidanto de ELNA proponis gedziĝon al Beth Magallon, lia koramikino. Ŝi akceptis. Kaj ni gratulas: feliĉon kaj interkomprenon!

## Konkurso pri jubilea simbolo por la 100-jara UEA

En 2008 Universala Esperanto-Asocio estos 100-jara. Por ekhavi grafikan identigilon, kiu kunligu ĉiaspecajn aktivaĵojn tra la mondo okaze de tiu festo, la Estraro de UEA lanĉis konkurson pri jubilea simbolo. La serĉata simbolo emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la daŭran aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj. Ĝi estu elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike. Ĝi estu unukolora aŭ plurkolora sed ankaŭ unukolore uzebla. La simbolo estos uzata nur lige kun la festado de la 100-jariĝo de UEA kaj ĝi ne anstataŭos la ĝeneralajn movadajn simbolojn.

## Gravaj informoj

Nia samklubano d-ro L. Kordylewski informis, ke estis retrovita E-filmo Incubus, dua E-filmo post la Angoroj: http://www.kirchersociety.org/blog/2007/03/27/incubus-the-esperanto-film/

### Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

### KUNVENOJ

**Kunvenoj de membroj de nia societo okazas la kvaran mardon de ĉiu monato kutime en:**

**Sulzer Public Library**, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101. Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Jen la informoj pri nia sekvantaj kunsidoj:

17an de Aprilo d-ino **Gertrude Novak** rakontos pri sia vojaĝo al Irlando

22an de Majo **Karlo Offutt** prelegos pri E-komponisto Lou Harrison**.**

***Atenton***: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj

